

# BULTENO de REU

OFICIALA INFORMILO DE RUSIA ESPERANTISTA UNIO  
№ 95, Marto 2018

## Karaj samideaninoj!

Oni diras, ke la monato marto estas pinta periodo en la vivo de la katoj. Sed eĉ ni, la katoj, scias, ke la 8-a de tiu monato apartenas al vi, niaj karaj dupiedaj mastrinoj, zorgantinoj, adorantinoj kaj adorantinoj!

Mi sincere gra(miaŭ)ntulas vin okaze de tiu glora tago kaj deziras al vi ĉiuspecan prosperon en ĉiuj sferoj, en la esperanta – unuavice.

Neniam tristu pro problemoj de akuzativo, verba transitiveco kaj ceteraj bagateloj – ili ne valoras larmojn en viaj ĉarmaj okuloj, kiu ajn koloron ili havu. Ĉe ĉiu problemo nur rigardu en la mi(aŭ)ajn, havantajn koloron de la esperanta stelo, kaj ekfeliĉu.

*Laŭ komisiio de Estraro de REU, ĉiam via*



*Marta Kato*

***Gratulojn!***



*La 4-an de marto nia kara fama poetino kaj tradukistino, aŭtorino de popularaj kantoj Ludmila Novikova festas sian jubileon, okaze de kiu ni ŝin sincere gratulas!*

*Kelkaj ŝiaj novaj verkoj estas publikigataj en la suplemento al tiu ĉi numero "Cerbe kaj kore" n-ro2. Jen estas kelkaj ŝiaj vortoj pri si:*

Mi naskiĝis la 4-an de marto 1953 en la urala urbo Miass (Ĉelabinska provinco). En la jargvylgTgTgVlgtTgTg 1974 finis filologian fakon de la Ĉelabinska pedagogia instituto, poste laboris en mezlernejo kiel instruisto de la rusa lingvo kaj rusa literaturo, en biblioteko. En 1979 translokiĝis en Moskvon, kie dum pluraj jaroj laboris en la Ĉefa konstrua organizaĵo (Главмосстрой). Pri Esperanto komencis okupiĝi en 1972, fininte elementan E-kurson en la Ĉelabinska E-klubo. En la 1970-aj jaroj aktivis en Volgo-Urala regiono de SEJM. En 1976-a jaro mi lanĉis la regionan literaturan-muzikan konkurson "Liro" en Miass, kiu funkciis dum 6 jaroj. En 1977 mi estis unu el la organizantoj de la "OrSEJT-19" apud Miass. Mi partoprenis plurajn regionajn kaj tutlandajn E-aranĝojn kaj la Universalajn kongresojn. La plej ŝatata okupo estas verkado kaj tradukado de poeziaĵoj en Esperanto.

## Poemoj por gratuloj

*Kunigante gratulojn al la virinoj ĝenerale kaj al aparta virino – Luidmia Novikova – ni publikigas du ŝiajn tradukojn el Konstantin Balmont, dediĉitaj al virinoj*

### ЖЕНЩИНЕ

Женщина - с нами, когда мы рождаемся,  
Женщина – с нами в последний наш час.  
Женщина – знамя, когда мы сражаемся,  
Женщина – радость раскрывшихся глаз

Первая наша влюблённость и счастье,  
В лучшем стремлении – первый привет.  
В битве за право – огонь соучастия.  
Женщина – музыка. Женщина – свет.

1917

### ЗОЛОТАЯ РЫБКА

В замке был веселый бал,  
Музыканты пели.  
Ветерок в саду качал  
Лёгкие качели.  
В замке, в сладостном бреду,  
Пела, пела скрипка.  
А в саду была в пруду  
Золотая рыбка.  
И кружились под луной,  
Точно вырезные,  
Опьяненные весной,  
Бабочки ночные.  
Пруд качал в себе звезду,  
Гнулись травы гибко,  
И мелькала там в пруду  
Золотая рыбка.  
Хоть не видели ее  
Музыканты бала,  
Но от рыбки, от нее,  
Музыка звучала.  
Чуть настанет тишина,  
Золотая рыбка  
Промелькнет, и вновь видна  
Меж гостей улыбка.  
Снова скрипка зазвучит,  
Песня раздается.  
И в сердцах любовь журчит,

### AL LA VIRINO


Ino – kun ni kiam estas naskataj ni,  
Ino – kun ni dum la lasta vivpart’.  
Ino – standardo por nia ataka kri’,  
Ino – admiro de ĝoja rigard’.

Ŝi – la unua ekstazo de amosent’,  
Ŝi – por plej alta ating’ inspiril’.  
En la porjusta batalo ŝi – flam-elfjet’.  
Ino – muzik’ por kor’. Ino – sunbril’.

*Traduko de Ludmila Novikova (2018)*

### ORA FIŜETO

Estis en kastelo bal’ –  
Festo muzikplena.  
Blovis la venteto al  
Balancil’ ĝardena.  
En kastel’ en dolĉa svag’  
Violono kantis.  
Kaj en la ĝardena lag’  
Ora fiŝo hantis.  
Kaj flirtadis sub la lun’,  
Kvazaŭ la ebriaj  
Pro printempa vivojun’  
Noktaj papilioj.  
Stelon lulis laga sin’,  
Herboj fleksgracilis,  
Ora fiŝ’ pro ilumin’  
En la lag’ movbrilis.  
Ĝin neniu vidis, sed  
Dum silent’ minuta  
Dissonadis de l’ fiŝet’  
Melodio fluta.  
Gastoj serĉis per rigard’  
Fonton de l’ trezoro,  
Kaj ridetis pro brilad’  
De la fiŝa oro.  
Sonas ree violon’,  
Daŭre pasas samo,  
Kaj en koroj lirlas font’




И весна смеется.  
Взор ко взору шепчет: «Жду!»  
Так светло и зыбко,  
Оттого что там в пруду —  
Золотая рыбка.

1903

De printempa amo.  
La rigardo al rigard'  
Diras: «Mi atendas!»  
Ĉar fluidojn por kor-ard'  
Ora fiŝo sendas.

*Traduko de Ludmila Novikova (2017)*

### **Versa gratulo al Ludmila Novikova**



Esperantisteco vivon faras bela  
Kaj la tradukarto pli sanigas ĝin.  
En la vivospeco bonespero hela  
Kantu via farto malgraŭ temrutin'!

Vorto poezia Esperanton penas  
Proksimigi grave al la lingva lum'.  
Esperanto via tian vorton benas  
Vive, bele, rave ĝoju via plum'!

Ĉiam plenjubilu via lingva belo  
Kaj pri versa vorto la aŭtoritat'  
Senestinge brilu via verda stelo  
Garde de la sorto kontraŭ ajna bat'.

Estu ĉiam sana, helpu al kreado  
Senti vivkolorojn helaj sen ĝojmank'.  
Rond' samideana ĉiu kamarado  
Al vi sendu florojn de la kora dank'.

*Klara Ilutoviĉ*

**Gratulojn!**

## Abduraĥman Junusov – 70-jara



Aĥman (Abduraĥman Gaĝijeviĉ) Junusov naskiĝis la 14-an de februaro 1948, E-on lernis en 1968. Do, li festis duoblan jubileon – 70-jariĝon de la tera vivo kaj 50-jariĝon de la vivo esperantista.

Kiel montras la fotoj, dum jaroj li ne forte ŝanĝiĝas! ☺

La meritoj de Aĥman por nia Movado ne supertakseblas. Tamen lia agado (ĉu bedaŭrinde, ĉu male – decidu ĉiu mem) ne limiĝas je Esperanto, li estas konata en

multe pli vasta medio de ĵurnalistoj kaj defendantoj de la homaj rajtoj. Jen traduko de lia prezento en populara interregiona paĝaro 7x7 (<https://7x7-journal.ru/blog/junusov>), el tio videblas, kion scias pri li la ekstera publiko:



*Junusov Abduraĥman Gaĝijeviĉ* < prezidanto de la Inform-politika centro “Rakurs”.

*Ekde 1972 laboris en la Dagestana ŝtata televido. Estis ĉefredaktoro de la unuiĝo “Rakurs”. Dum multaj jaroj gvidis la propran “rektoeteran” programon “Rakurs”.*

*Ekde 1994 ĝis 1996 estis redaktoro de la revuo «Eventoj» en Budapeŝto. En 1996 laboris en la revuo «Monato» en la lingvo Esperanto.*

*Dufoje li estis elektita Prezidanto de Rusia Esperantista Unio, Komitatano A de Universala Esperanto-Asocio. Partoprenis plurajn kongresojn, konferencojn, seminariojn, ligitaj kun evoluigo de la rusia kaj internacia Esperanto-movado.*

*Laboris vicĉefredaktoro de la ĵurnalo “MK-Kaŭkazio-Dagestano”, ĉefredaktoro de la ĵurnalo “Ĥronika nedeli” (Laŭreato de la premio de la tutrusia konkurso “Vopreki” [“Spite”]).*


*Membro de la Rusia Ĵurnalista Unio.*

*Kunordiganto de la projekto de la Moskva Helsinka Grupo “Observado de la homaj rajtoj en regionoj de Rusio” en Respubliko Dagestano.*

*Prelegadis en Svedio, Hungario, Belgio, Germanio, Francio, Polio. Ĉefredaktoro de la ĵurnalo “Dagestanskij rakurs” (Diplomo de la Internacia festivalo de ĵurnalistoj pro ciklo de publikajtoj pri la homaj rajtoj. Membro de Socia konsilio ĉe la Komisiito pri homaj rajtoj de Respubliko Dagestano.*

Do, esperantistaj okupoj de Aĥman digne videblas!

Ni sincere gratulas lin kaj deziras pliajn sukcesojn en ĉiuj kampoj de lia agado kaj ankaŭ reaktivoĝon en la enlanda Esperanto-movado!



*Estraro de REU*

## **PROTOKOLO № 11 de la Estrara decido**

Dato: Moskvo, 09.02.2018

Voĉdonado: reta

Voĉdonis S. Smetanina, N. Gudskov , M. Ĉertilov, I. Gonĉarova,

A. Lebedev, A. Mitin, V. Opletajev.

TAGORDO / TEMO

Pri la partopreno de REU en la tutrusia civitana socia aktivaĵo “La lasta adreso” kaj omaĝo al pafmortigitaj sovetiaj esperantistoj en la jaroj de la reprezalioj de la reĝimo de Stalin.

### **DECIDO**

- 1) **Aprobi la iniciaton de N. Gudskov pri kontaktoj kun aktivuloj de la projekto “La lasta adreso” kaj partoprenigo de moskvaj esperantistoj la 28-an de januaro 2018 en la inaŭguro de la memoriga tabulo pri la pafekzekutita esperantisto Nikolaj Incertov (1896 – 1937).**
- 2) **Konsideri la partoprenon de membroj kaj asociitaj kolektivoj de REU en la tutrusia projekto “La lasta adreso” unu el gravaj aktualaj aktivaĵoj kaj agadoj.**
- 3) **Komisii al N.Gudskov kunordigi la agadon de rusiaj esperantistoj pri trovado kaj identigo de nomoj de reprezaliitaj esperantistoj kaj periode informi pri ĝi en “Bulteno de REU”.**
- 4) **Komisii al N.Gudskov verki koncizan rekomendaron pri necesaj dokumentoj kaj konkretaj paŝoj al kunlaboro kun la neregistara organizaĵo “La lasta adreso” por eventuala instalo de memorigaj tabuloj pri pafmortigitaj esperantistoj.**
- 5) **Rekomendi al la regionaj REU-kunordigantoj kaj lokaj reprezentantoj de REU iniciati esplorserkadon de reprezaliitaj esperantistoj en regionoj kaj urboj de RF por posta surmurigo de memorigaj nomtabuloj pri ili kunlabore kun la neregistara organizaĵo “La lasta adreso”.**
- 6) **Rekomendi al la regionaj REU-kunordigantoj, lokaj reprezentantoj de REU, klubaj aktivuloj verki kaj publikigi en “Bulteno de REU” materialojn pri esperantistoj diversgrade reprezaliitaj dum la jaroj de la Granda teroro (1937 – 1938).**

REZULTOJ DE LA VOĈDONADO:

por: 6;

kontraŭ: 1;

sin detenis: 0.



*Prezidanto de REU: S. Smetanina  
Vicprezidanto de REU: N. Gudskov*

## **Deklaro de la Estraro de REU pri histori-esplora agado de rusiaj esperantiistoj**

La tutrusia civitana aktivaĵo, celanta la eternigon de nomoj de pafmortigitaj kaj krimleĝe ekzekutitaj homoj en la jaroj de la ŝtata teroro kaj reprezalioj en Soveta Unio, estis en 2013 iniciatita de moskvaj kaj sankt-peterburgaj ĵurnalistoj, historiistoj, rajtodefendantoj, aktivuloj. La projekton kunordigas kaj gvidas moskva ĵurnalista Sergej Parĥomenko. Ĝi estas realigata de la samtitola nekomerca fondaĵo en la kunlaboro kun la histori-kleriga societo “Memorialo”. Memore pri pafekzekutito sur la muron de domo, en kiu iam loĝis tiu homo, oni metas metalan polmograndan platon, memorigantan nur pri unu persono konforme al la fundamenta principo de la projekto “Unu nomo, unu vivo, unu signo”. La instalado de memorigaj platoj komenciĝis decembre de 2014. En 2017 la projekto iĝis internacia, ĉar al ĝi aliĝis ankaŭ aktivulaj grupoj en Ĉeĥio kaj Ukrainio.

La memorsigno (memoriga tabuleto), kreita de rusia arkitekto Aleksandr Brodskij, aspektas kiel metala ortangula plato el rustimuna ŝtalo 11x19 centimetrojn granda. Sur ĝi estas indikataj persona kaj familia nomoj, profesio de la maljuste kondamnita kaj reprezaliita homo, datoj de naskiĝo, aresto, pafekzekuto kaj rehabilito.

la 28-an de januaro 2018 en Moskvo sur la muron de domo, kie loĝis Nikolaj Jakovleviĉ Incertov (1896-1937), unu el la gvidantoj de SEU (Sovetrespublikara Esperantista Unio), estis instalita memoriga plato omaĝe al li. La personaj datumoj sur la memorsigno komunikas, ke Nikolaj Incertov estis esperantisto pafekzekutita kaj rehabilitita. La inaŭguran ceremonion partoprenis estraranoj de REU kaj moskvaj esperantistoj.

La Estraro de REU akceptis decidon rilatan al la tutrusia projekto “La lasta adreso” kaj konsideras ĝin grava aktivaĵo ebliganta indan omaĝon al esperantistoj de nia lando, pereintaj antaŭ 80 jaroj. La Estraro alvokas individuajn kaj kolektivajn membrojn de REU kaj ĉiujn neasociitajn esperantistojn atenti la agadon de lokaj aktivulaj grupoj de “La lasta adreso”, laŭpove kunlabori kun ili kaj proponi por memoreternigo nomojn de pereintaj esperantistoj.

Pasis multaj jardekoj post la tragedia periodo en la historio de Soveta Unio, ne ĉiuj domoj kaj adresoj el tiuj jaroj konserviĝis, estas tre malfacile retrovi dokumentojn pri senkulpaj mortigitoj, sed se rezulte de nia komuna agado sur dommuroj de iuj urboj aperos lastadresaj memorigaj tabuloj pri esperantistoj, tio estos signo de nia homa kaj civitana solidarecoj, tio estos esprimo de nia kredo pri neeblo de ripetigo de tiaj teruraĵoj iam ajn en la estonteco.

En privataj familiaj kaj klubaj arkivoj, ankaŭ en ŝtataj arkivoj estas historiaj dokumentoj, fotoj, kopioj de publikigitaj tekstoj, manuskriptoj pri esperantistoj, kiuj traspertis la muelilojn de la Granda teroro kaj restis vivaj, aŭ pri esperantistoj, kiuj vivis en tiuj jaroj sed feliĉokaze evitis persekutojn. Memorpunktaĵoj pri tiuj homoj, eĉ estu ili ne detalaj raportoj sed tre malgrandaj kaj koncizaj noticoj, povas iĝi alia direkto de nia komuna agado, kiu ligos firmajn pontojn inter esperantistoj de diversaj generacioj kaj pli fidinde prezentos al esperantistoj de la nuna tempo historiajn dimensiojn, atingojn kaj perdojn de la enlanda esperantista movado.



# Regularo pri la konkurso pri informa artikolo

*Informado pri Esperanto, kiu estas historie kaj praktike elprovita iinstrumento de la interlingva kaj interkultura komunikadoj, konsistigas gravan parton en laborplanoj de esperantistaj kolektivoj kaj en la agado de apartaj movadaj aktivuloj.*

## **La Estraro de REU anoncas konkurson pri modela informa artikolo pri Esperanto.**

1. Celoj de la konkurso:

- verkigi moderna(j)n informa(j)n artikolo(j)n pri Esperanto;
- disponigi al individuaj kaj asociitaj membroj de REU variajn informajn materialojn en la rusa lingvo;
- stimuli esperantistojn kaj esperantistajn klubojn al informkampanjo pri Esperanto en rusiaj amaskomunikiloj.

2. Celgrupo de konkursantoj

La konkurson rajtas partopreni apartaj esperantistoj kaj esperantistaj kolektivoj sendepende de ilia membreco en REU.

3. Postuloj por verkota artikolo:

- La artikolo estu verkita en la rusa lingvo.
- Ĝi devas ampleksi 1-3 paĝojn A4-formataj.
- Oni uzu la 12-punktan tiparon “Times New Roman”, ordinarajn marĝenojn kaj la interlinian spacon 1,5.
- La artikolo entenu:  
socilingvistikan karakterizaĵon de Esperanto;  
informojn pri L. Zamenhof kaj la historio, simboloj, aplikosferoj kaj funkcioj de Esperanto, faktojn pri tutmonda esperantista movado, Rusia esperantista movado;  
ligilojn al retejoj por memlernado de Esperantokaj laŭbezzone kontaktojn kun lokaj grupoj aŭ apartaj esperantistoj;  
posedi bonstilan lingvaĵon kaj bone kompreneblan strukturon.

4. Kondiĉoj por konkursantoj:

- La konkurson rajtas partopreni kiel profesiaj ĵurnalistoj tiel ankaŭ neprofesiaj verkantoj, apartaj esperantistoj, esperantistaj kolektivoj kaj grupoj.
- La konkursanto (individuo aŭ grupo) prezentu personajn datumojn:  
persona nomo, familia nomo / nomo de esperantista klubo, profesio, urbo, kontakta retadreso.

5. Ĵurio

La ĵurio de la konkurso konsistas el la membroj de la Estraro de REU. La laboron de la ĵurio gvidas Svetlana Smetanina – Prezidanto de REU, Nikolao Gudskov – Vicprezidanto de REU.

La gajnintojn de la 1a, 2a kaj 3a lokoj elektas per voĉdonado konforme al la kondiĉoj kaj postuloj, menciitaj en la paragrafoj 3, 4 de la Regularo, la membroj de la Estraro de REU.

La ĵurio ne komentas publike elektitajn kaj premiitajn artikolojn.

La Estraro de REU honoras la gajninton kaj laŭreatojn de la konkurso per diplomo kaj librodonaco kaj laŭ ilia deziro senpage (re)aligas ilin al la membraro de REU.

La Estraro retenas al si la rajton afiŝi la premiita(j)n verko(j)n en la oficiala paĝaro de REU kaj publikigi ilin en “Bulteno de REU”.

6. Limdatoj

La konkurso daŭros dum 4 monatoj, ekde la 1a de marto 2018 ĝis la 1a de julio 2018.

La artikolojn en reta formo akceptas Nikolao Gudskov [nikolao@yandex.ru](mailto:nikolao@yandex.ru) kaj Svetlana Smetanina [svsmetanina@yandex.ru](mailto:svsmetanina@yandex.ru) ĝis la mezo de junio 2018.

La rezultoj de la konkurso estos proklamitaj julie dum RET-2018.



## Aranĝoj okazontaj

### ArTe

#### AROMA TERO

##### Informletero 1

FLORANTA KRIMEO ATENDAS VIN!!!

Jalta Esperanto – klubo “Tero” organizas omaĝe al memoro de Jefim Zajdman printempan E-renkontiĝon “**Aroma Tero**” = “**ArTe**”. Ĝi pasos sub auspicio kaj organiza helpo de REU.

Datoj: 29.04 – 5.05.2018

Loko: u. Jalta, sanatorio je la nomo de Kirov, centre de la urbo.

Kondiĉoj: 2-lokaj ĉambroj kun necesejo kaj duĥejo. Eblos aldoni fotelliton aŭ faldliliton. Tiukaze prezo malaltiĝos.

Programo: E-kursoj (kun ebla ekzameno por dezirontoj), kvizoj, koncertoj, interesaj ekskursoj,

diskutrondoj, prelegoj, lingva babilejo, vesperaj ludoj, promenoj kaj multo alia.

Prezoj: 6 diurnoj en 3-loka ĉambro kun 2 manĝoj (matene kaj vespere) = 8.000 rubloj;

6 diurnoj en 2-loka ĉambro kun 2 manĝoj = 10 600 rubloj.

Tagmanĝon eblos mendi aparte.

Aliĝkoto: 500 rbl por REU-membroj, 700 rbl por nemembroj de REU.

Limdato por aliĝo estas la 20-a de marto. Aliĝkoton kaj dezirindan antaŭpagon por loĝado minimume 1000 rublojn bonvolu sendi al la kasisto de REU Aleksandro Lebedev, petante lin pri pageblecoj, oportunaj por vi : [amikko@yandex.ru](mailto:amikko@yandex.ru). En la mesaĝo indiku: “Por ArTe de s-ro Ivanov”.

Krimeanoj pagu surloke al s-no Anĵela Belenko.

Kontaktojn por programkontribuontoj, ideoj, helpo ktp. bonvolu adresi al Svetlana Smetanina [svsmetanina@yandex.ru](mailto:svsmetanina@yandex.ru) kaj Anĵela Belenko [glicino@mail.ru](mailto:glicino@mail.ru)

Karaj artemuloj, verkistoj, kantistoj, poetoj kaj muzikistoj! Vi estas aparte invitataj kaj atendataj!!!

Per la aktiva partopreno kaj kontribuo al la programo ni subtenu la E-movadon en Krimeo!!!

Bonvenon al ĉiuj al belega Jalta, ĉe bordo de Nigra maro!!!

## RUSIAJ ESPERANTO -TAGOJ - 2018 (RET-2018)

Ĉi somere nin atendas ĉarmega, ekologie pura pitoreska loko apud la antikva mezrusia urbo Ŝuja (317 km nordoriente de Moskvo). RETon -2018 gastigos eksa bieno de la loka negociisto Ivan Neburĉilov, kiu konstruis ĉi domegon ĉe la bordo de la rivero Teza en la arbaro por sia edzino antaŭ kelkdeko da jaroj. Dum 70 jaroj en la bieno lokiĝis orfejo, nun ĝi apartenas al privatulo, multo ŝanĝighis, tamen la ĉefa domo ĝis nun ekzistas. Surteritorie oni konstruis gastdometojn, estas lauboj, banejo, kafejo, ktp. La teritorio estas sufiĉe granda kun aliro al la rivero. Belegaj tiliaj aleoj memoras ankoraŭ la unuan domposedanton.

Dum RET krom kutimaj programeroj: E-kursaro, prelegaro, koncertoj, diversaj artaĵoj kaj gajaj vesperoj, literaturaj programeroj, ktp. planatas allogaj duontagaj kaj tuttagaj ekskursoj al

antikva urbo Ŝuja kun vizito de kelkaj muzeoj, naskiĝ-kaj loĝlokoj de Konstantin Balmont, vingustumado en fama vodkofabriko “Ŝujskaja vodka”, promeno tra malnovaj stratetoj de la kvietaj urbo, kiu aĝas pli ol 500 jarojn. Ni vizitigos al vi mondfame konatan vilaĝon Paleĥ – centro de laka miniaturo kaj ikonoj. Ni iros al u. Ivanovo por ĝui solan en la lando muzeon de ŝtofoj, kaj dezirontoj vizitos domon de Cvetaeva-familio. Je kelkaj kilometroj de nia RETejo troviĝas funkcia vira Nikolo-Ŝartoma monaĥejo, kiun eblas vidi kaj konatiĝi kun vivo de pli ol 100 monakoj.

### **Datoj: 01-09 de julio 2018.**

Kondiĉoj: du- kaj trilokaj ĉambroj en gastdometoj. Laŭbezono oni lokigos nin en la malnova bona domo, po 6-8 homoj enĉambre. Estas kelkaj ĉambroj kun 2-lokaj familiaj litoj.

Prezoj: 1200 rbl pro persono/diurno, inkluzive matenmanĝon.

Tagmanĝo+vespermanĝo = pagatos aparte kaj kostas 500 rublojn.

Aliĝkoto: por REU-membroj 1200 rbl, por nemembroj 1500 rbl.

Bonvolu pagi al la kasisto de REU Aleksandro Lebedev samtempe mesaĝante vian nomon kaj vortojn “RET-kotizo por...”

Limdato por aliĝo estas la 15-a de majo. Poste la aliĝkoto plialtiĝos je 100 rbl por ambaŭ kategorioj.

Aliĝilo troviĝas en la paĝaro [www.reu.ru](http://www.reu.ru)

Kontribuantoj por la programo kaj diversaj ideoj, proponoj bonvolu skribi al Nikolao Gudskov [nikolao@yandex.ru](mailto:nikolao@yandex.ru) kaj Svetlana Smetanina [svsmetanina@yandex.ru](mailto:svsmetanina@yandex.ru)



**Bonvenon, bonvenon, bonvenon!**

## ***Aranĝoj okazintaj***

### **MER-12**

La 4-an de februaro 2018 nia Moskva Esperanto-renkontiĝo en nia kun Anna loĝejo okazis jam dekduan fojon. Ĉi-foje partoprenis dudek unu personoj el tri landoj. MER tradicie daŭris ĉirkaŭ 10 horojn, estis tre riĉa programo, inkluzive koncerton de M. Bronŝtejn.

*D. Ŝevĉenko*



## Amo + APERo

AMO–Seminario – 44 (Aktivula Maturigo) pasis tre sukcese kaj efike en Apudmoskvo inter 20-22 de februaro 2018j.

Partoprenis 15 personoj el 10 loĝlokoj kaj 6 regionoj de Rusio. Streĉa, sed ege interesa kaj densa programo vekis intereson de aktivuloj, novuloj kaj igis ĉiujn ege serioze labori: pridiskuti diversajn projektojn, ideojn, planojn. Du plenaj tagoj pasis rapidege kaj tute nerimarkeble. La Seminario pasis perfekte, fruktodone kaj neniun lasis indiferenta. Ni esperu, ke ĝhiaj ideoj efektiveghu kaj realighu en regionoj, urboj, kluboj.

Dankegon al organizantoj, helpantoj, partoprenantoj!

Tre detala informo pri la aranĝo aperos post prilaboro de la protokolo.

*Sv.Smetanina*

### De AMO al APERo

Unika evento okazis la 20-22-an de februaro en apudmoskva ripozejo “Jerŝovo”. Temas pri la unua Tutrusia AMO-Seminario (Seminario pri Aktivula Maturigo). Ĝi pasis sub la aŭspicio de

UEA kiel ĉenero de la primovadaj seminarioj tra la tuta mondo kaj laŭ la UEA- registroj havas la numeron 44. Sed por nia grandega lando tiu ĉi AMO estis la unua (post estiĝo de Rusia Federacio) provo okazigi seriozan primovadan laborkunvenon, koncernan al la evoluo de la Rusia Esperantujo. La temo de nia AMO estis superaktuala (kaj supermalfacila): “Modernigo kaj junigo de la Rusia Esperanto-movado”.

Unu el organizaj malfacilaĵoj estis kolekti reprezentantojn de ĉiuj ok federaciaj regionoj, dum laboraj tagoj. Tempon por longdistancaj vojaĝoj havas pensiuloj, sed ili ne havas monon. Tiuj, kiuj povas permesi al si la vojelspezojn, tiutempe devas labori. Kaj nia celgrupo – studentoj – havas nek monon (ĉar ne laboras), nek tempon (ĉar studas). Senelira situacio, ĉu? Nur ŝajnas. Agu – kaj vi atingos.

AMO-44 kolektis 15 homojn el kvar federaciaj regionoj: 10 el la Centra (Moskvo k Moskva gubernio), po du el la Nord-Okcidenta (u. Sankt-Peterburgo kaj La Granda Novgorodo) kaj Suda (u. Novočerkassko kaj Volgogrado), 1 venis de la plej E-prospera Urala regiono (u. Jekaterinburgo). La aĝo de 7 partoprenintoj estas malpli ol 41 jaroj, la plej juna havas 13. 8 inoj kaj 7 viroj – por kompletigi la statistikon. Sed, eble, plej gravas, ke inter la ĉeestintoj estis kaj spertegaj, kaj komencantaj aktivuloj (la sola laborlingvo estis Esperanto). La aranĝon organizis Moskva Esperanta Asocio MASI kun intima kunlaboro kun Rusia Esperantista Unio. Partoprenis 9 REU-membroj (el kiuj 4 REU-estranaroj) kaj 8 membroj de MEA MASI. Do, formiĝis tre proporcia kaj tre laborema amika kolektivo, kies ĉiufankaj avantaĝoj tuj montriĝis. Kaj dum laboro eĉ formiĝis sento, ke por la



unua AMO en niaj kondiĉoj bezonatas nek pli da homoj, nek alia homkonsisto. Vespere la 20-an de februaro, post la afereca Malfermo, kie estis elektita la konstanta protokolanto de AMO-44 (*Kirill Noviĉenko*), komenciĝis la prepara parto de la programo: la seminario de Irina Gonĉarova “Kio estas tiu ĉi AMO por ni”. Ni spektis ankaŭ lumbildprezentadon de REU-prezidanto Svetlana Smetanina pri la aktuala stato de E-movado en Rusio.

En la sekva, kerna, tago de la programo (21.02), okazis la kvarhora trejnado “Kio estas rusia esperantistaro kaj kia estu ĝia estonto”, gvidata de *Irina Gonĉarova* laŭ la metodo de la tradicia por multaj AMOJ FLAM-analizo de la nuna situacio kaj EKEK-solvoserĉado “Kiel plibonigi la situacion en Rusio”. Ĝin sekvis la trihora trejnado “Kiel organizi E-agadon” de *Alisa Zingerman*, laŭ SPRINT – la vaste konata trejnado de projektstartigoj. Samvespere *Irina Gonĉarova* okazigis la Rondan Tablon “Informado kaj varbado. Kiel allogi gejunulojn al E?” Kaj malfruvespere post la streĉa labortago ni bonege ripozis en plej hejmeca amika etoso, kiu ĉiam kreiĝas ĉirkaŭ *Svetlana*, kun multaj ŝercoj kaj anekdotoj el Esperanta vivo kaj kun agrabla gustumado de bonaj vinoj.

La 22-an de februaro ni daŭrigis la trejnadon pri varbado, kies temo multe agitis la partoprenintojn.

Post pridiskuto de la protokolo kaj akcepto de komunaj konkludoj venis tempo por konkretaj projektoj. La REU-vicprezidanto *Nikolao Gudskov* detale raportis kun lumbildoj pri la tute nova REU-projekto “Lasta adreso”, al kiu bonus allogi esperantistaron de la tuta lando. Temas pri pendigado de memorŝildoj sur la domojn, el kiuj sovetaĵaj esperantistoj estis veturigataj al prizonoj kaj pereoj en la morna tempo de la stalinaj reprezalioj. Por iom distriĝi kaj vigliĝi post la streĉcerbaj temoj ni ĉiuj tre volonte partoprenis la gajan lingvan metiejon de *Svetlana* pri absurda frazfarado, kiu multe helpus lingvinstrue kaj etose dum ajna esperantista kunveno.

Intertempe komencis jam alvenadi la partoprenontoj de APERo-12, kiuj poiomete aliĝadis al nia dekkvinopo. Kaj ĉiun sekvan AMO-programeron partoprenis pli kaj pli da APERanoj.

Tuj post la tagmanĝo (abunda kaj bongusta, kiel ĉiuj bufed-manĝoj en la bazejo) okazis prezentado de jam ekzistantaj Esperantaj projektoj en la hodiaŭa Rusio: *Rafija Kudrjavceva* rakontis pri la tradiciaj ĉeestaj renkontiĝoj en Jekaterinburgo kaj Uralo kaj pri la interretaj projektoj de tiu ĉi plej bone organizita Esperanta regiono en Rusio. Irina Gonĉarova prezentis kvar la plej “junaj” projektoj de MEA MASI (“Esperanto: la unua kanalo”, “Esperanta PoŝtKruciĝo”, “MiA MASI” kaj “Internacia videobabilejo kun moskvaj esperantistoj”). La baza ideo estis, ke eĉ unu persono kapablas krei grandan internacian projekton. Kiel “Hejman taskon” al la homoj estis proponite verki sian propran projekton laŭ la donita skemo.

Sekvis negranda videoenkonduko kaj granda interaktiva pridiskuto laŭ la temo “Ideologioj de esperantismo. Kio vi estas?”, organizita de *Nikolao Gudskov*.

Venis la momento Fermi la AMOn, kaj ni tion faris kun plena kontento pri granda fruktodona laboro. Ĉiuj emis pli profunde studi kaj analizi la materialojn de tiu ĉi seminario kaj deziris daŭrigi la aktivadojn en niaj loĝlokoj.

Jes – okazis la Solena fermo, sed fakte la seminario ne ĉesis! Enkadre de APERo-12, jam kun partopreno de kromaj dekoj da diversaj homoj, ni entuziasme daŭrigis dum la trejnado “Ligoj inter E-generacioj”, okazigita de Raifa, dum la diskutrondo “Kiu estas bona esperantisto kaj kion ni povas fari por Esperanto kaj la Movado” de Ilja Gnusarjov, en kularoj dum kunvenoj de gejunuloj gvid’ de *Kirill Noviĉenko*... Sed tio jam estas eroj de la bunta kaj feliĉa vivo de nia amata APERo...

Kaj nun ja tempas resumi pri AMO!

La laboro kaj kunagado dum AMO-44 multe kuraĝigis kaj inspiris ĉiujn. Iĝis evidente, ke tio ĉi estas nur la unua paŝo el la longa marŝado laŭ la malglata vojo de movada organizado. Ni estu

sinceraj – ni tion antaŭdeziris. Tial jam sur nia aŭŝo apud la kutima AMO-44 aperis la nova siglo, kiu, certe, eĉ pli ridetigos vin: AMoRu-1. En ĝi reveliĝas nia espero realigi la primovadajn seminariojn en Rusio regule kaj fruktodone.

Do – de AMO tra AMo.RU al APERo – de la moderna kaj gejunulplena Esperantista Movado en Rusio!

*Irina Gonĉarova (laŭ La Ondo de Esperanto, 2018, n-ro3(281)*

## **REALIGITA PROGRAMO de Seminario pri AMO-44/AMo.RU-1**

**Rusio, Jerŝovo, 20-23.02.2018**

Sub aŭspicio de UEA

Organizantoj: MEA MASI, REU

Laboraj lingvoj: Esperanto.

**20.02.2018, mardo: AMo**

20:30-21:00 Solenaĵo: Malfermo de AMO-44 –

*I.Gonĉarova, S.Smetanina.*

- Kio estas AMo-seminarioj: difino, celoj, temaro. – *I.Gonĉarova.*

- Celoj de tiu ĉi AMO, perspektivoj. – *S.Smetanina.*

- Prezentoj de la ĉefaj programeroj. – *La gvidantoj.*

- Elektro de la konstanta protokolanto. Elektito: *Kirill Noviĉenko.*

21:00-22:30 Trejnado: Kio estas tiu ĉi AMO por ni. – *I.Gonĉarova.*

23:00-23:20 Lumbildprezentado: Aktuala stato de E-movado en Rusio. – *S.Smetanina.*



**21.02.2018, merkredo: AMo**

Trejnado: Kio estas rusia esperantistaro kaj kia estu ĝia estonto. – *I.Gonĉarova*

11:00-12:30 Parto 1. FLAM-analizo de la situacio: Kio estas la nuna rusia esperantistaro.

12:45-14:00 Parto 2. EKEK-solvoscado: Kiel plibonigi la situacion en Rusio.

Trejnado: Kiel organizi E-agadon. – *A.Zingerman.*

16:00-17:30 Parto 1. SPRINT – *A.Zingerman*

17:45-18:45 Parto 2. SPRINT – *A.Zingerman*

21:00-22:30 Ronda Tablo: Informado kaj varbado. Kiel allogi gejunulojn al E? – *I.Gonĉarova.*

22:30-00:00 Gaja vespero.

**22.02.2018, ĵaŭdo: AMo+APERo**

10:30-11:20 Ronda Tablo (daŭrigo): Kiel allogi gejunulojn al E? – *I.Gonĉarova.*

11:20-12:20 Prelego+Konsilejo: Lasta adreso. – *N.Gudskov .*

12:30-13:30 Metiejo : Amuzaj vortludoj dum instruado de Esperanto. – *S.Smetanina.*

12:00-14:00 – **APERo-12: Alveno**, registriĝo, enloĝiĝo. – *Aleksandr Basov.*

15:00 -16.50 Prezentado: Funkciantaj E-projektoj en Rusio. – *R.Kudrjavceva, I.Gonĉarova.*

17:00-18:30 Diskutado: Ideologioj de esperantismo. Kio vi estas? – *N.Gudskov .*

18:40-19:15 **Fermo de AMo** – *S.Smetanina, I.Gonĉarova*

20:30-22:00 Solenaĵo: **Malfermo de APERo**. – *I.Gonĉarova, T.Orjol.*

22:00-22:40 Koncerto: *Tatjana Orjol.*

22:50-23:00 Lingva Ludo: Rebusoj. – *M. Povorin.*

23:00 Nokta-nokta fin': Teumado, kantado, tabluludoj.

\*

### **Kelkaj programeroj de AMo okazos enkadre de APERo-12 en la tagoj 23-25.02:**

- Prelego: Kie kaj kiel lerni Esperanton interrete. – *Alisa Zingerman*
- Prelego: Esperanto kiel revolucia ideo kaj Zamenhof kiel revoluciulo. – *Nikolao Gudskov*
- Trejnado: Ligoj inter E-generacioj. – *Raifa Kudrjavceva*
- Diskutro: Kiu estas bona esperantisto kaj kion ni povas fari por Esperanto kaj la Movado. – *Ilja Gnusarjov*
- Filmo-raporto: 102-a UK en Seulo. – *Kirill Noviĉen*



## **Revolucia APERo-12**

Se vi ĝis nun ne scias: APERo estas AntaŭPrintempa Esperanta Renkontiĝo, fine de ĉiu februaro organizata de la Moskva Esperanta Asocio MASI okaze de la propra naskiĝtago (la 24-an de februaro). Kio speciala estas en ĝi? Unue, ĝi estas strukture malkrokodila. Tial ni nomas ĝin lingvomergigilo. Kiu bezonas lingvomergigon? Ĝuste: komencantaj esperantistoj, memlernantoj, unuopuloj sen sufiĉa lingva praktiko. Kiu liveras la konvenan lingvan medion? Ĝuste: la spertaj esperantistoj, kiuj senerare parolas la lingvon. Pri kio? Pri ĉio. Ja Esperanto estas normala lingvo, kaj lerni ĝin ne ĉiam signifas partopreni diversnivelajn lingvajn kursojn. Lingvaj kursoj ĉe APERo – neniam, por tio ekzistas specialaj aranĝoj. Primovadaj aferoj – maloftaj hazardaĵoj. Pri kio do temas? Temas pri bona, agrabla tempopasigo. Sed jen embusko: por tro multaj esperantistoj bona tempopasigo signifas intelektajn okupojn! Tial aperas prelegoj, debatoj, intelektaj ludoj – kaj aliaj saĝ(ig)aj distraĵoj. Ajnaj – kion proponas ne la organizantoj, sed la partoprenantoj. Ĝi estas via aranĝo, unuavice de la programa vidpunkto. Gastoj ĉi tie ne estas. Via tempo, via temo, vi mem organizas vian eventon, vian – kaj nian komunan – APERon. Nu – jen...

La temo de la APERo-12 estis “Revolucioj”. Ĝin elektis MASianoj dum iu parola klubkunveno. Elektis ne sen influo de la 100-jariĝo de la oktobra renverso. Elektis, anoncis kaj forgesis. Ne eblas diri, ke tra multaj monatoj iu pensadis, kiel la temo malkovriĝos dum la aranĝo. Estis pli

logike supozis, ke ĝi malkovriĝos neniel. Tamen okazis miraklo: laŭtemaj programeroj surprise kaj bele abundis.

Kiam venis kun siaj proponoj la akademiano de EA d-ro Nikolao Gudskov (Moskvo), ekklarigis, ke la temo jam estas savita. Liaj brilaj profesiaj prelegoj nomiĝis tiel: “La plej granda revolucio en la historio”, “Revolucioj – sociaj kaj sciencaj”, “Esperanto kiel revolucia ideo kaj Zamenhof kiel revoluciulo”.

La sociala aktivulino Irina Gorodeckaja (u. Novoĉerkassk) konvene kompletigis la temon per novforma sociaga trejnado “Forumo-teatro: La revolucio de civitana aktiveco”. La brava novulino, lingva instruistino kaj poligloto Alisa Zingerman (MEA MASI, u. Moskvo) okazigis prelegon “Revolucioj en lingvoedukado” kaj amuzajn lernigajn debatojn “Revolucio kontraŭ evolucio.” Aldoniĝis du prelegoj de niaj amataj APERaj bardoj Sergeo Straŝnenko (Rigo) kaj Mikaelo Povorin (Moskvo): “Revolucio de Johann Sebastian Bach” kaj “Revolucio de la skaraboj” – pri “The Beatles”.

Serŝado de novaj (ĉu ne vere revoluciaj?) vojoj en la Rusia E-movado vigle pasis dum la trejnado de Raja Kudrjavceva (u. Jekaterinburgo) “Ligoj inter E-generacioj”. Lerta gvido de spertinterŝanĝo pri diversaj aspektoj de esperantisteco far’de Ilja Gnusarjov (MEA MASI, u. Penza) kondukis la ardantan partoprenantaron laŭ la padoj al la revolucioj en siaj propraj mensoj. Kaj pli profunden en la homan psikon entiris la APERanojn la rolludoj de la infanpedagogoj Morgan Maliĉ kaj Viktorija Prijmak (MEA MASI, Moskvo) “Kiel vi kondutus, se...”



Novaj interaktivaj metodoj de aranĝoj malkovris miraklajn talentojn aktori ĉe ĉiuj. Tiu etosiga trajto reliefigis jam dum la Solena Malfermo, kiam interaktivajn ludojn gvidis la profesia kantistino kaj animatoro Tatjana Orjol (u. Volgogrado). Konstantaj interagoj, grupa dinamiko, team-disputoj, opiniinterŝanĝoj, reciprokaj konsiloj kaj psikologia subteno formis el la kutima

aranĝo ne nur klerigan kaj amikan, sed nove profundan, animpenetran kaj emociplenan. Tiuj tute ne planitaj, neatenditaj trovaĵoj faris la APERon-12 vere revolucia por si mem – ja nun ĉiuj feliĉaj spertintoj dezirus evoluigi la novajn agadmetodojn en la sekvaj APERoj.

Ni finu per iom da seka statistiko. El la 40 APERanoj 24 estas membroj de MEA MASI; 17 loĝas ne en Moskva Gubernio (urboj: Arĥangelsko, Jekaterinburgo, Kievo, Novoĉerkassko, Ĥanoĵo, Rigo, Penzo, Sankt-Peterburgo, Volgogrado, Uljanovsko). La aĝo de 24 partoprenintoj estas malpli ol 41 jaroj, la plej juna havas 13 jarojn, la plej aĝa – 75 (okazis neniu disdivido laŭ aĝaj grupoj). 23 inoj kaj 17 viroj.

Pliaj detaloj pri AMO kaj APERo-12 (protokoloj, priskriboj de programeroj, impresok voĉdonadoj ks) poere aperados en la vK-grupo APERo:

[https://vk.com/apero\\_ek\\_masi](https://vk.com/apero_ek_masi)

Ah – bedaŭrindas, ke ne troviĝis la loko mencii la amasan intelektan teamludon “Kio? Kie? Kiam?” fer’ de la 13-jara Pjotr Fedosov (MEA MASI) kaj la de ĉiuj ŝatatan Tradukistan Konkurson, preparitan de Larisa Ŝapoŝnikova (u. Arĥangelsko) – kiun, cetere, ĉe la plej supra

nivelo denove senkonkurence gajnis Pjotr Fedosov... Kaj jen – ankoraŭ ja du bonegaj koncertoj de Sergeo Straŝnenko kaj Mikaelo Povorin...

Bonvenon al la sekva APERo, unuvorte! Spertu mem!

*Irina Gončarova, (laŭ La Ondo de Esperanto, 2018, n-ro3(281)*

**Nota pri statistiko.** El 15 partoprenintoj estas MASlanoj – 8, REUanoj – 9 (el kiuj 4 estas REU-estraranoj); el la Centra Regiono (Moskvo k Moskva gubernio) – 10 homoj, Nord-Okcidenta Regiono (u. Sankt-Peterburgo kaj Granda Novgorodo) – 2, Suda Regiono (u. Novoĉerkasko kaj Volgogrado) – 2, Urala Regiono (u. Jekaterinburgo) – 1.

La aĝo de 7 partoprenintoj estas malpli ol 41 jaroj, la plej juna havas 13 jarojn, la plej aĝa - 75 jarojn. 8 inoj kaj 7 viroj. 2 partoprenintoj de AMo ne partoprenis en APERo.

El la 40 APERanoj: 24 estas membroj de MEA MASI; 17 loĝantoj en ne Moskva Gubernio. Urboj: Arĥangelsko, Jekaterinburgo, Kievo, Novoĉerkasko, Ĥanojo, Rigo, Penzo, Sankt-Peterburgo, Volgogrado, Uljanovsko; la aĝo de 24 partoprenintoj estas malpli ol 41 jaroj, la plej juna havas 13 jarojn, la plej aĝa – 75; 23 inoj kaj 17 viroj.

## Instruado

### Instruado de Esperanto en Rusio (Instrusezono: aŭgusto 2017 – majo 2018)

1. La unua duono de la nuna lernojaro finiĝis, kaj ni povas vidi unuajn rezultojn de la instrua laboro de deko da kursgvidantoj en diversaj urboj de nia lando. Pli amasaj rilate al la nombro de kursanoj iĝis dumarangaj kursoj en Poŝeĥonjo kaj Jekaterinburgo. Sed ankaŭ tradiciaj movadaj kursoj prezentas rimarkindajn sukcesojn. La aŭtora kurso “FaRo”, gvidata de Irina Gončarova, atingis absolute rekordan nombron 50! Irina sukcese efektivigas sian personan instruprojekton ekde 2002, kaj dum 15 jaroj ŝi instruis Esperanton al kelkaj centoj da homoj. Gratulojn kaj multajn novajn sukcesojn ni deziras al nia kolegino!

#### 2. Tabelo pri la okazigitaj kursoj

N <sup>o</sup>	Urbo	Nomo de la kursgvidanto	Titolo / tipo de la kurso	Nivelo	Nombro de kursfinintoj
1	Jekaterinburgo (Lingvotrejnado-3)	Darja Zelenina (Ĉelabinsko) Vladimir Opletajev (Surguto) Roman Jefremov (Glazovo) Tatjana Vŝivceva (Miasso) Konstantin Ĥlizov (Jekaterinburgo) Irina Gončarova (Odincovo)	Movada, dumaranga, baza kurso	A1- A2	5
2	Jekaterinburgo (Lingvotrejnado-3)	Darja Zelenina (Ĉelabinsko) Vladimir Opletajev (Surguto) Roman Jefremov (Glazovo)	Movada, dumaranga, progresiga kurso	B1 – B2	14
3	Moskvo	Irina Gončarova	“FaRo-49”	A1-	8



			(“Faru rondon!”) Movada, baza kurso	A2	
4	Moskvo	Artur Grigorjev	“Lingvo Esperanto”. Universitata, baza kurso	A1 – A2	8
5	Novosibirsko	Katerina Arbekova	Movada, baza kurso		
6	Omsko	Vasilij Masjagin	Movada, baza kurso	A1	3
	Poŝehonjo (RET-2017)	Gonĉarova Irina (Odincovo)	“KoRo” (“Konversacia rondo” Movada, dumaranĝa, progresiga kurso	A2, B1 – B2	7
7	Poŝehonjo (RET-2017)	Mihail Ĉertilov (Balaŝiĥo)	Movada, dumaranĝa, baza kurso	A1 – A2	8
8	Surguto	Vladimir Opletajev	“Vintra Esperanto-kurso” Movada, baza kurso	A1	4
9	Tomsko	Konstantin Obrazcov	Universitata, progresiga kurso	A2, B1 – B2	1

3. Daŭre funkcias diversnivelaĵoj kursoj en Ĉeboksaro (kursgvidanto: Aleksandr Blinov), Ĉeboksaro (Jelena Nadikova), Krasnojarsko (Vladimir Sapojnikov), Krasnojarsko (Dmitrij Konoŝonkov), Moskvo (Irina Gonĉarova), Moskvo (Anna Striganova, Dmitrij Ŝevĉenko), Murmanko (Andrej Rjazancev), Novokuznecko (Tatjana Kolajeva, Nina Lvova), Sankt-Peterburgo (Vjaĉeslav Ivanov), Tihvino (Mikaelo Bronŝtejn), Tobolsko (Dilara Gadirova), retaj kursoj por blindaj esperantistoj (ĉeforganizanto kaj gvidanto Nikolaj Solomencev el Kostromao kun instruista kolektivo: Vjaĉeslav Suslov, Irina Surovceva, Tatjana Nikitjuk).

4. Karaj kolegoj-kursgvidantoj, ne menciitaj en ĉi tiu estiminda instruista listo, sendepende de via membreco aŭ nemembreco en REU, vi estas petataj ĝis la mezo de majo 2018 informi pri kursoj de Esperanto en viaj urboj kaj kluboj, gviditaj de vi. La resuma raporto estos verkita fine de majo. Pro manko de statistikoj el pasintaj jaroj ni ne povas kompari niajn rezultojn kun pli fruaj datumoj, sed aktualaj faktoj povas nin konvinki pri pli-malpli stabila situacio ĉi-jara, promesanta esperigajn atingojn sur la eduka kampo.

Mi dankas ĉiujn klubgvidantojn kaj instruistojn de Esperanto pro la kunlaboro. Sukcesojn al ĉiuj!

*Vladimir Opletajev*



## Vintra Esperanto-kurso en Surguto, januaro 2018



## Irina Gončarova kaj kursanoj de FaRo-49, novembro 2017

### FaRo la 50-an fojon

“Bonvenon! Faru la rondon!” Per tiu ĉi frazo komenciĝas ĉiu leciono de la baza parola Esperanta kurso “Faru la rondon!” (FaRo). La 31-an de januaro brile pasis la 5-a leciono de la jubilea FaRo-50.

Mi rimarkis, ke la kursoj kun belaj numeroj kutime ne estas la plej elstaraj. Ankaŭ pri tiu ĉi, la 50-a, estis sufiĉe da malgataĵoj: la kursanoj malmultis, ĉu kvar, ĉu eĉ tri, iuj ekmalsanis, alia forveturis... Nur ĉe la 5-a leciono la grupo kolektiĝis en plena konsisto: 5 gelernantoj. Kaj nun eblas kun certeco diri, ke la kurso estas bonega!

Kiu pruvo? Kutime al la mezo de la kurso, kiam la lernenda materialo pli kaj pli akumuliĝas, la homoj malkovras, ke mirakloj ne okazas kaj necesas multe labori por la sukceso. Ĉiuj jam spertis ke dum la lecionoj ili daŭre ne ĉiujn frazojn komprenas, ke ili denove ne faris la hejman taskon pro manko de tempo, ke verkitaj eseoj enhavas tro da eraroj, ktp. Unuvorte, homoj

laciĝas kaj iom seniluziĝas pri facileco de Esperanto (kiun, cetere, al ili neniu promesis!). Tial la lecionoj N 5 kaj 6 estas normale la plej senentuziasmaj kaj pro tio la plej malfacilaj (poste tio mirakle pasos).

Sed ne en la kazo de la FaRo-50! La grupo pli kaj pli vigliĝas, pli kaj pli aktivas, ĉiuj estas plene enŝaltitaj dum daŭro de la tuta trihora leciono, plezure dialogas, sketĉas kaj ludas. Labori kun tia grupo estas granda plezuro.

Kio estas la grupanoj? Du el ili jam multfoje ĉeestis en la paĝoj de MiA MASI: Jelena Bereĵkova (en la kurso – la brazilano Elvirina Timiro) kaj Aleksandra Ĥoĥlova (la finnino Agema Senriproĉe). Jam MASInanoj, ili estas kaj, certe, estos niaj aktivulinoj. La tria junulino estas unu el la gevizitintoj de mia septembra enkonduka prelego en la klubo “Locus Solus”, kiun mi traktis fiaska, ĉar venis nur tri homoj. Jelena Sovuŝ (la poldevena usonano Justa Ĝusta) decembre venis al alia mia prelego kaj jen nun estas kun ni. Konstantin Markeon (Savi Scipovas, la turko el Bulgario) atendis eblon trafi la kurson ekde la malfermo de la Esperanta Parola Klubo (EPoKo) en la kinejo “Kosmo” decembre-2016 kaj finfine organizis liberan tempon por la Esperantaj lecionoj. De kie aperis la enigma Viktor Semjonov (la japano Miasano Kiabona) scias neniu: tagon antaŭ la 4-a leciono li demandis min pri la kurso en la socia reto VKontakte kaj estis akceptita. Do, neniam endas rifuzi de la kurso pro malmulto de lernantoj. Kvin gelernantoj plus la helpema Karter Riĉmond (Aleksandr Basov) – kaj jen la perfekta grupo.

Nu, miaj karaj, nun ne seniluziigu nin! Sambrave partoprenu la kvin restajn lecionojn de FaRo-50 – kaj venu kvinope al la resuma Lingva Olimpiko!

*Irina Gonĉarova (Mirinda Strigo)*

Laŭ <https://miamasi.weebly.com/uploads/1/1/0/9/110968997/mia-masi-2018-02-a.pdf>

## Hura! La KER-ekzameno denove okazos!!!

Dum Universala Kongreso en Suda Koreio (Seulo en 2017) la iniciatinto de la KER-ekzamenoj tutmonde sinjorino Katalin Kovacs oficiale anoncis sian demision post la 10-jara laboro en tiu serioza tereno. Ni ekĉagrenis, ĉar la afero estas inda kaj bezonata. Eĉ dum la lasta REU-Konferenco sonis la propono kaj ekis la decido daŭrigi propraforte la ekzamensesiojn kaj apogi tiun projekton. Feliĉe venis la informo, ke Katalin daŭre okupiĝos pri KER- ekzamenoj.

Kio ĝi estas? Novtipa ekzameno de UEA laŭ la Komuna Europa Referencokadro (KER). Estas ellabortaj taskoj por niveloj B1, B2, C1 (el ses ekzistantaj niveloj). La atesto estas impona, oficiala dokumento, verkita en 4 lingvoj (angla, franca, germana, Esperanto) kaj estas agnoskata kiel alialingva lingvoekzamena diplomo en Europa Unio.

Ĉi jare tra la mondo la KER-sesioj okazos la sepan fojon, en Rusio la okan, ĉar ni gajnis unufoje plian sesion pro tre aktiva varbado kaj la plej granda nombro de ekzamenantoj je nivelo C1.

Ĝis nun en Rusio la skribaj KER-sesioj okazis po unufoje en Jekaterinburgo, Ĉeboksaro kaj ĉiujare en Moskvo. En la tutmonda listo de sukcesintoj Rusio okupas trian lokon. Ĝis nun ĉe ni ekzameniĝis 146 personoj en diversaj niveloj. Kelkaj insiste pasis ĉiujn tri nivelojn kaj havas 3 atestojn.

La ĉijara skriba KER-sesio en Moskvo okazos la 19-an de majo, sabate. Mi invitas ĉiujn dezirantojn ekzameni siajn sciojn kaj ricevi belan dokumenton. Kiu jam ekzameniĝis, rajtas veni al pli alta nivelo. Estas invitataj esperantistoj el aliaj urboj. Kiu bezonas lingvajn konsultojn aŭ havas demandojn pri organizo de simila aranĝo en sia urbo aŭ regiono, bonvolu turni vin al mi. Bonvenon al ĉiuj!

*Svetlana Smetanina, chefororganizanto de KER-sesioj en Rusio.*



## Mikaelo (Miĥail Konstantinoviĉ) Ĉertilov (25.04.1961 – 24.02.2018)



En la ĉevolga urbo Liskovo ĵus forpasis Mikaelo Ĉertilov, unu el la plej grandaj aktivuloj de Rusia Esperanto-movado dum lastaj 30 jaroj, estrarano de REU kaj gvidanto de ties komisiono pri eksteraj rilatoj. Li naskiĝis en Kemerovo, sed poste transloĝiĝis al Niĵnij-Novgoroda regiono, al urbo Liskovo, kie finis en 1978 mezlernejon n-ro 2. En 1983 li finis Moskvan energetikan instituton, kaj fariĝis inĝeniero pri vaporkaldronoj, kvankam dum la vivo estis ne nur sukcesa inĝeniero en termo-elektro-centraloj, sed ankaŭ laboris en turisma firmao, kreis propran etentreprenon “Sunvojo”, ktp. Li longe loĝis en apudmoskva urbo Odincovo kaj laboris en Moskvo; en 2010-aj jaroj revenis al Liskovo zorgi pri sia maljuna patrino, post kies forpaso revenis al Moskvo, laboris kaj loĝis en Balaŝiha-Jeleznodorojnij. Estas entombigita en Liskovo.

Mikaelo estas esperantisto ekde 1986 jaro. Jam fine de 1980-aj li ekaktivis en la movado – organizis plurajn renkontiĝojn (la unua lia estis en 1989 tendaro en Tuĉkovo apud Moskvo, la lasta – partopreno en la organiza teamo de RET-2017 en Poŝehonjo; tre gravis lia laboro en organizo de REK en Peterburgo en 2010), ellaboris dokumentojn, multe okupiĝis pri eksteraj rilatoj, i.a. pri E-kunlaboro de BRICS-landoj, prelegis pri tio en sciencaj konferencoj en Moskvo kaj Sankt-Peterburgo.. Li estis delegito kaj peranto de UEA, organizis kaj kunorganizis karavanojn de rusiaj esperantistoj al UK-oj. Pro intereso al eksteraj rilatoj en 1990-aj jaroj li multe kaj aktive kunlaboris en tiam interesiĝinta pri Esperanto Transnacia Radikala Partio, kaj ties fako “Esperanto” Radikala Asocio (ERA). En 1990-aj li ankaŭ multe kunlaboris kun SAT, kaj en 2000-a estis unu el kunorganizantoj de SAT-kongreso en Moskvo. Li grave aktivis en REU, plurfoje estis elektata en ties Estraron, kaj en 2009-2010 estis ĝia Prezidanto. Lia forta flanko estis ĉiam zorgo pri bona prilaboro de diversaj laborreguloj kaj aliaj organizaj flankoj de la Movado. Dum multaj jaroj li estis organizanto de Libro-servo, kiu provizis per leĝaĵoj esperantistojn de la tuta lando.

Li aktivis ankaŭ en la projekto “Ekparolu” ĉe la retejo [edukado.net](http://edukado.net) – gvidis 13 paroligajn sesiojn per skajpo.

Gravas ankaŭ kontribuo de Mikaelo al evoluigo de Esperanto-kulturo. Li esperantigis libron de Harry Harrison “Invado: Tero” (2012) kaj tradukis du romanojn de Sergej Lukjanenko “ – “Kavaliroj de kvardek insuloj” (kun S. Smetanina, 2009) kaj “La nokta patrolo” (kunlabore kun teamo de tradukistoj; eldonita en tri partoj, 2006-2007).

Forpaso de tia aktivulo estas granda perdo por la Movado. Ni ĉiam danke memoros lian ĉiaman bonkorecon kaj trankvilecon en la plej malfacilaj situacioj, veran amikemon, kunsentemon kaj helpemon.

*Estraro de REU kaj ĉiuj esperantistoj – amikoj de Mikaelo*

---

**Bulteno de REU (BdR) estas oficiala informilo de la tutrusia socia organizaĵo**

**“RUSIA ESPERANTISTA UNIO”**

**BdR atendas viajn lokajn, regionajn novaĵojn! Bonvolu sendi ilin al Nikolao Gudskov [nikolao@yandex.ru](mailto:nikolao@yandex.ru) aŭ (kaj) Svetlana Smetanina [svsmetanina@yandex.ru](mailto:svsmetanina@yandex.ru)**

*Estraro de Rusia Esperantista Unio*